



Esperanto en Danio

17-a jarkolekto • n-ro 1 • januaro 2010



Frontpaĝo de baldaŭ aperonta vortaro

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Bent Jensenius

Regin Larsen

Ole Terkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

Retadreso: eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.04.2010

Enhavo

| | |
|---|-----------|
| Defia jaro..... | 3 |
| Jarraporto de DEA..... | 4 |
| Paperaj gazeteltondaĵoj..... | 13 |
| Næstved..... | 14 |
| Kopenhago..... | 15 |
| Vespero honore al Prof. Ivo Lapenna | 16 |
| Tre interesa evoluado en la anglalingva mondo..... | 17 |
| La eŭropa lingvo..... | 18 |
| 26-a Rusia Esperantista Kongreso..... | 21 |
| Studu en Slovakio..... | 23 |

Defia jaro

– aŭ la antaŭjaro de la jaro!



Jen denove jaro pasis kaj ni pli kaj pli alproksimiĝas al nia grava venontjara evento: la 96. UK en Kopenhago, sed ne nur: ILEI decidis ke la ILEI-konferenco kaj simpozio okazos ankaŭ en Kopenhago dum la semajno antaŭ la UK. Kiel antaŭe menciite la UK okazos en Bella Centro kaj la ILEI konferenco en la Homscienca Fakultato de la Kopenhaga

Universitato en Amager. Fine de la konferenco okazos simpozio kun partopreno de universitataj profesoroj. La unua kunveno pri la simpozio okazis jam kiam Radojica Petrović vizitis nin komence de decembro kaj diskutis la temon kun Robert Phillipson kaj lektoro Karsten Fledelius de la Homscienca Fakultato.

Finfine post pli ol tri kaj duona jaroj da intensa laboro, la dana-Esperanta vortaro estas preta por eldono (vidu la kovrilon sur la unua paĝo), kaj oni certe povos ĝin aĉeti dum la jarkunveno de DEA. Per tiu eldono ni esperas plenumi urĝan taskon kiu mankis al nia movado dum jardekoj.

Eĉ se lastjare ni proponis Odense kiel la loko de la jarkunveno, ni tamen decidis okazigi ĝin en la Kulturdomo en Kopenhago pro ekonomiaj kialoj. Nia ĉi-jara gasto estos la konata redaktoro de la revuo Esperanto, kaj aŭtoro de la furore vendita lernolibro "Esperanto den direkte metode". Ni ĝojos bonvenigi multajn partoprenantojn al nia jarkunveno, kie ni certe povos informi pli pri la laboro de ambaŭ LKK. Ne hezitu tuj aliĝi!

Bonvenon al grava defia jaro!

Ileana Schröder

Jarraporto de DEA

Pri la agado dum 2009

Ankaŭ la jaro 2009 estis speciala jaro pro la 150-a jubileo de L.L. Zamenhof kaj la 100-a jubileo de Ivo Lapenna kies jubileo estis rimarkita en speciala numero de nia revuo. Dum la jaro ni ĉeestis en pluraj foiroj, festivaloj, paca marŝo, reprezentis nian movadon en la UN-Asocio, kaj organizis la 150-an jubileon de L.L.Zamenhof kunlabore kun la pola ambasado la 25-an de septembro. Rimarkinda estis ankaŭ la organizo de la Kultura Esperanto Festivalo fare de organiza teamo kiu okazis en julio en Elsinoro. Legu pli detale sube.

Dum la jaro ni devis bedaŭrinde denove adiaŭi plurajn maljunajn membrojn pro ilia forpaso: Bent Bjarke Nielsen, Jenny Nielsen, Erik Hansen, Grete Petersen kaj Kurt Evald Jensne. Fine de la jaro nia asocio nombras 224 membrojn. La vortara laboro pludaŭris dum la jaro, kaj nia vortara grupo finis la laboron en decembro, kaj ni planas eldoni la vortaron komence de 2010.

La jaro fariĝis speciala ankaŭ pro la fakto ke jam en februaro ni estis kontaktitaj de la turista agentejo de Kopenhago kiu instigis nin inviti la esperantistaron al UK al Danio kaj la urbo. Post hezita periodo kiam ni informis niajn membrojn pri tiu ebleco dum la jarkunveno kaj konsultiĝis kun UEA, ni finfine akceptis la kandidatiĝon, kaj dum la 94-a UK en Bjalistoko la estraro de UEA konfirmis ke la 96-a UK okazos en Kopenhago. Estas vere granda defio por nia dana movado, kaj la novelektita LKK jam delonge komencis sian laboron.

La 9-a KEF

La internacia festivalo KEF okazis de la 7-a ĝis la 12-a de junio en Elsinoro kaj unu tagon en Helsingborg. Ĝi enhavis riĉan kulturan kaj muzikan programon kun literaturaj metiejoj, koncertoj kun 15 muzikgrupoj, prelegoj, esperantokurso, danco k.t.p. Ĉeestis pli ol 100 danaj kaj eksterlandaj esperantistoj en bona kaj fruktodona etoso. Precipe efika estis la drumorkestro kiel reklamo de esperanto al loĝantaro de Elsinoro. La lokaj gazetoj skribis plurajn artikolojn pri la aranĝo entute tre sukcesa.

Omaĝe al 150a jubileo de L.L.Zamenhof kaj Tago de Lingvoj

La 25-an de septembro DEA kaj la Pola Ambasadoro Adam Halamski invitis al akcepto ĉe la pola ambasado, omaĝe al 150a jubileo de L.L.Zamenhof kaj la Eŭropa Tago de Lingvoj. DEA deziris okazigi la jubileon la 15an de decembro, sed pro okupiteco de la pola ambasado okaze de la grava klimata konferenco meze de decembro, ni devis trovi alian tagon, kaj decidis kunigi la jubileon kun alia rimarkinda evento kiel la Tago de Lingvoj. La programo konsistis el bonvenigaj vortoj de la Ambasadoro kaj de la DEA-prezidanto, sekvis parolado de la prezidanto de EEŬ, Séan O’Riain, akordiona muziko fare de Kim Henriksen, Stanislaw Mielczarek deklamis la poemon ”La Vojo” kaj post kantado de la du himnoj, la aranĝo finiĝis per riĉa bufedo ofertita de la gastiganto. 50 membroj de DEA partoprenis la eventon.

Informado

Esperanto en Danio

La revuo aperis 5 foje, kaj la 4a numero kun speciala aldono pri Ivo Lapenna omaĝe al lia 100-jara jubileo. Ni klopodis eldoni pli interesan revuon kun multaj bildoj kaj varia enhavo.

Informa materialo

E@I kaj ILEI eldonis belan kaj allogan esperantlingvan broŝuron , kiun ni tradukis al la dana lingvo kaj mendis eldonon ĉe E@I. DEA ricevis la broŝureton fine de la jaro, kaj uzos ĝin kiel alloga varbilo por interesitoj.

Novaĵletero

En oktobro DEA sendis la unuan Novaĵleteron al siaj membroj. La celo de la nova informa letero estas sendi informojn kaj novaĵojn inter la elsendo de Esperanto en Danio. Do, ĝi ne aperas regule, sed kiam ni havos interesajn aŭ gravajn informojn kiuj ne estas prokrasteblaj. La unua letero havis informojn pri la pac-marŝo.

Gazetoj

Komence de junio estis en la Nordselandaj gazetoj multaj artikoloj pri la Kultura Esperanto-Festivalo en Helsingør, entute cirkaŭ 13. Cetere en lokaj gazetoj aperis dum la jaro po du-tri mencioj pri niaj membroj Lars Pilegaard kaj Jacob Nordfalk, kaj en la retrevuo videnskab.dk aperis artikolo pri la laboro de Eckhard Bick pri aŭtomata tradukado. Krome estis du nekrologoj, kiuj menciis ke la forpasinto estis esperantisto. Ne mankis ankaŭ la kutimaj kalendaraj notoj pri la agado en Næstved kaj unu de la jarfine malfondita Kultura Esperanto-Grupo en Kopenhago.

Multaj mencioj cetere tute ne dependas de danaj esperantistoj. Ekzemple la uzo de “Esperanto“ kiel metaforo pri komuna aŭ nekomprenebla lingvo estas sufiĉe kutima, kaj Weekendavisen en granda artikolo recenzis la libron “In the land of invented languages“ (en la lando de inventitaj lingvoj) de la usona aŭtorino Arika Okrent.

Kvankam la rikolto ne estas impone granda – cirkaŭ 60, se oni ĉion enkalkulas – estas surprize ke la 150a naskigdatreveno de Zamenhof en decembro estis menciita nur en unu artikolo en la revuo Kommunikation eldonita de LAK (Landforeningen for Kommunikation) en sia decembra numero, bele ilustrita pere de bildo de la EEU-kongreso en Herzberg kaj intervjuo al Ileana Schrøder pri la lingvo kaj movado. Espereble la decido pri la UK en Kopenhago en 2011 spronos al pliaj artikoloj.

La tekstoj de la registritaj artikoloj estas rete legeblaj ĉe la adreso <http://uk.groups.yahoo.com/group/esperantonyt>.

Prelegoj

La 8an de aŭgusto Ileana Schrøder prelegis pri Esperanto en la Internacia Altlernejo en Elsinoro okaze de la 60a jubileo de Servas, la organizo kiu similas al nia Pasporta Servo (internacia interszanĝo de gasto).

Okaze de la Tago de Lingvoj, la 25an de septembro Ileana Schrøder estis invitita prelegi al 4 klasoj de la lernejo Skt.Josef de Roskilde, kie ŝi interalie montris kelkajn partojn de la informfilmo “Esperanto estas ...”.

Partopreno en aranĝoj

Kultura Festivalo

La Kulturdomo Bispebjerg aranĝis kulturen festivalon de la 5. – 14. de junio 2009. La 5a de junio estis aparte festata kiel alternativa festo de la dana konstitucio, kaj DEA partoprenis kun malferma tago kaj aranĝis koncerton kun Esperanto Desperado.



Lingva Tago

DEA partoprenis la 23an de aŭgusto en la Lingva Tago kiun aranĝis Sprogskolen. Krom budo kun esperantolibroj kaj broŝuroj, la prezidantino prelegis pri esperanto.

Tago de paco

Okaze de la tago de paco DEA partoprenis en pacfoiro sabate la 12-an de septembro en La Kulturdomo Karens Minde, Valby. Ni havis budon kun diversaj reklamiloj, kaj ni montris kelkajn partojn de la filmo “Esperanto estas ...”

La festivalon partoprenis ankaŭ la ambasadoro de Kubo kiun ni salutis kaj informis ke DEA venontjare partoprenos la UK-n en Havano, prezentante Kopenhagon kiel venonta UK-urbo.

Pacmarŝo

La asocio “Peace Alliance” organizis konferencon la 30an de oktobro en kiu partoprenis DEA. Vespere estis organizita lumfesto ĉe la lago Peblinge kaj Ileana Schrøder estis intervjuita de la dana televida kanalo TV2 Lorry pri nia ĉeesto al tiu aranĝo. La lasta evento okazis la 31an posttagmeze: la marŝo de la Parlamento al la Urbodomo, kiun partoprenis 15 danaj esperantistoj.

Partopreno en foiroj

Kiel kutime DEA partoprenis en Foiro Krop-Sind-Ånd de la 30-a de januaro ĝis la 1-a de februaro, kaj en Ålborg de la 27-a de februaro ĝis la 1-a de marto 2009.

Eksteraj rilatoj

DEA ĉeestas regule la kunvenojn de la reprezenta komitato de la UN-Asocio. La Forumo de la organizoj ĉe Balta Maro kunvenis unufoje en la jaro.

Instruado

ILEI-sekcio

Raportas Bent Jensenius



La kursanoj de Radojica Petrović

Dum la jaro la sekcio aranĝis semajnfinajn kursojn kun prof. Alexander Melnikov, Atilio Orellana Rojas kaj prof. Radojica Petrović. La kursoj estis tre sukcesaj kun multaj partoprenantoj.

Koresponda kurso

Meze de la jaro ni ricevis novan korespondan kurson surbaze de la lernolibro de Stano Marcek, kaj jam 10 personoj aĉetis ĝin kaj sekvas la lekciojn.

IRE – Internacia Rajtigita Ekzamenantaro

ILEI kontaktis nin pri kandidatoj al IRE kaj en aprilo ni ricevis informon ke Jonas Dalmose kaj Jens Stengaard Larsen estis elektitaj kiel membroj

de la Internacia Rajtigita Ekzamenantaro IRE . ILEI volis havi pli da kompetentuloj por realigi la ekzamenojn, kaj Jonas Dalmose funkciis jam dum la ekzamenoj ĉe UK en Bjalistoko. Antaŭ la UK li partoprenis en SES kaj tie ekzameniĝis en la plej alta nivelo. Gratulojn!

Aplikado

Revu-kaj Libroservo

Raportas Arne Casper

La vendado normaliziĝis en 2009. Tio signifas ke la fina kalkulaĵo pliboniĝis kompare al 2008. La vendado de la lernolibro de Stano Marcek daŭre progresas, kaj nun ni atendas la eldonon de la nova vortaro Dana-Esperanto kiu estas preskaŭ preta.

La Revuservo havas konstantan abonantaron, sed ni ĉiam bonvenigas novajn abonantojn.

Ĉefdelegita laboro

Raportas Arne Casper

Pro forpasoj kaj eble ankaŭ pro la ekonomia krizo, la nombro de danaj individuaj membroj de UEA malkreskis iomete, kaj la nombro estas 94, sed la sopiro estas atingi 100 membrojn!

DEJO – Dana Esperanto-Junulara Organizo

Raportas Regin Larsen

Dum la pasinta jaro DEJO agadis je diversaj flankoj. Jam la 3-an fojon ni organizis renkontiĝon ĉe la Roskilde-Festivalo kaj ĉi-foje partoprenis 50 esperantistoj de Eŭropo, Ukrainio, Rusio, Japanio kaj Brazilo. La renkontiĝo estis sukcesa, kaj ni gajnis monon pro nia tiea laboro, kiun ni parte uzis subtenante KEF-on. Ĉi-jare ni denove organizos la Roskilde-renkontiĝon, kaj invitas 100 esperantistojn, kiuj ekhavas senpagan enirbileton, domlokon en tendo kaj manĝaĵon kontraŭ 24 horoj da laboro.

Jonas Dalmose kaj Michael Branebjerg organizas Esperantan kurson ĉe la Libera Instruista Lernejo en Ollerup, kaj tie starigis Esperantan bibliotekon per libroj donitaj de DEA. Regin Larsen dum la aŭtuno okazigis kursojn en la junuldomo en Kopenhago, kaj dume gvidas studgrupon.

DEJO-anoj ankaŭ vojaĝis al aliaj landoj por partopreni kongresojn kaj renkontiĝojn. Jonas Dalmose, Rasmus Aagaard kaj Regin Larsen partoprenis en Somera Esperanto-Studado aranĝita de la teamo malantaŭ lernu.net. Rasmus partoprenis progresigan kurson, kaj Jonas kaj Regin instruistan kurson por kio ili ricevis subvencion de DEJO kaj DEA. Krom tio membroj ankaŭ partoprenis en KEK en Danio, IJK en Ĉeĥio, UK en Pollando, Oranĝa Renkontiĝo en Svedio kaj JES en Pollando. Mathias Dalmose ĵus vojaĝis al Japanio, kie li dum 3 monatoj interalie instruas Esperanton. DEJO subvenciis lian vojaĝon.

Jarraportoj de la kluboj

Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago

Raportas Betty Chatterjee

Dum 2009 KEK havis 60 membrojn, inkluzive 1 honoran. Tial dum la jaro la membraro malkreskis je 9 membroj.



Bonhumoro dum la instruado de Atilio Rojas

Dum la jaro forpasis unu membro, nome Bent Bjarke Nielsen.

Printempe 2009 pro la translokiĝo de la Junulara Domo al la kulturo-domo oni devigis nin mem translokiĝi al nia nuntempa ejo, Tomsgårdsvej 35.

Kursoj kaj studgrupoj: La studgrupo gvidata de Bent Wiinberg daŭre legis la libron ‘Faktoj kaj

Fantazioj’ kaj de tempo al tempo oni legis aliajn tekstojn interalie de Claude Piron. Printempe Arne Casper-Mortensen gvidis grupon da lernantoj, kiuj eklernis Esperanton en 2008. Babilada grupo lunde renkontiĝis ĝis la somera klubfermo en la klubejo. Aŭtune ekfunkciis grupo de komencantoj (6 personoj) gvidata de Zita Garbaravičienė laŭ la

Cseh-metodo. Bent Jensenius gvidas grupon de daŭrigantoj laŭ lia libro 'Bonvenon en nia mondo.'

La kluba programo enhavis la jenajn prelegojn:

- 'Laoso la estonteco kaj la turismo.' Jan kaj Lene Niemann.
- 'Kultura Esperanto-Festivalo 2009.' Kim Henriksen.
- 'La mirindaj eblecoj por esperantistoj ĉe la interreto.' Regin Larsen.
- 'Vikipedio.' Ruth Jesus.
- 'Plezuroj kaj malplezuroj de vortaro-kompilanto.' Jens Stengaard Larsen.
- 'La 2- a Mezorianta Kunveno en Turkio.' Betty Chatterjee
- 'Vizito al Madrido.' Bent Jensenius
- 'Orepoka bildo.' Birgit Andersen.
- 'Charles Darwin kaj lia signifo por la dana literatur-historia trapaso'. Egon Starup.
- 'La vivo kaj la agado de Ivo Lapenna.' Birthe Lapenna
- 'Martinus og den ny verdensmoral.' Ole Therkelsen
- 'Ĉu vi kongresos en Kubo en 2010?' Ileana Schrøder.

Aliaj aranĝoj inkluzivis kantvesperojn, distrajn vesperojn kaj du aŭkciojn. Kelkfoje ni parolis pri libroj legitaj aŭ ni rakontis pri kunportitaj diversajoj. Bent Jensenius defiis nin per muzikaĵoj el diversaj landoj. Ni ekskursvesperis en la restoracio 'De Små Haver'. Ni somerfestis kaj kristnaskfestis. Okaze de la 10-a Internacia Patrinlingva Tago la klubanoj danigis la Deklaron de UEA pri lingvaj homaj rajtoj, kaj tiu nun legeblas en la dana ĉe <http://www.uea.org/informado/un-deklaro.html>.

Laŭtradicie KEK havis budeton ĉe Peblinge Dossering dum la Internacia Tago de Kopenhago.

Post la decido ke Kopenhago gastigos la UK-on en 2011, la klubanoj komencis tradukan laboron kun la apogo de la Næstved klubanoj.

Pro la sufiĉe favora monstato de la klubo ni povis monapogi aliajn esperantajn asociojn, kies agadoj ankaŭ helpas la membraron de KEK: edukado.net, Kulturo-Esperanto Festivalo kaj DEA. La kasisto informos al vi pri tiuj ĉi elspezoj.

Fine mi volas danki la estraron de KEK, la klubanaron, DEA-n kaj aliajn esperantistojn ekstere de la klubo pro la apogo dum 2009.

Esperanto-Unuiĝo de Næstved

Raportas Grethe Nielsen

La jaro 2009 enhavis ordinarajn klubkunvenojn, danlingvajn prelegojn, someran ekskurson kaj kristnaskan lunĉon.

Ni daŭre uzas la legolibron Faktoj kaj Fantazioj, posttagmeze aŭ vespere, la somera ekskurso iris al Kongsted kaj al la kalkminejo en Fakse, kaj ĝi finiĝis en la plej bela maniero ĉe Bente kaj Lars en ilia ĝardeno.

Estis entute 6 danlingvaj prelegoj, kaj kiel antaŭe ili estis plurloke menciitaj en la loka gazetararo. En januaro Anna kaj Erik rakontis pri multaj bonaj travivaĵoj kiel koboldoj, en februaro Lene kaj Jan pri Hurtigruten, en marto Peter Weide pri sia Esperanto-vivo. La aŭtuna sezono komenciĝis per Gunnar Langelykke, kiu en oktobro rakontis pri Antarktio, en novembro Hans Jørgen Kristensen pri Aŭstralio kaj Nov-Zelando kaj en decembro Ole Pilegaard Hansen pri geneologio – ĉiuj interesaj prelegoj, kiuj allogis gastojn ekster niaj rondoj.

La poŝta stampilo Esperanto – et mellemfolkeligt sprog bedaŭrinde ne funkciis dum 2009. Espereble ĝi funkcios nun en 2010, sed ni ne scias.

Nia Novaĵletero aperis 4 fojojn, la estraro kunvenis 1 fojon, nombro de aranĝoj estis 14, kaj meza nombro de partoprenantoj estis 12,1. La membronombro nun estas 22.

Kiel pasintjare DEFA uzas nian klubojn unu fojon monate dum la vintra sezono.

Dankon al ĉiuj, kiuj ebligis nian agadon.

Århus Esperanto-klubo

Raportas Stanislaw Mielczarek

Esperanto-klubo de Århus havas nun 34 membrojn. Ni kutimas kunveni la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato. Ni daŭre kunvenadas en Senior-Centret, kiu situas en la centro de Århus.

La situacio de la klubo ne pliboniĝis. Male! En la 2009-a jaro ni perdis multjaran membrinon, nome Grete Petersen. Ŝi ripozu en paco!

Kelkaj klubanoj, kiuj en 2008 komencis kurson, ne finis ĝin kaj rezulte malmembriĝis.

Intertempe venis nova membro – Hugo Andersen, kiun ni bonvenigas en nia klubo.

La 27-an de majo 2009 nia klubo fariĝis 100-jara! Tiun jubileon ni festis dum la somera ekskurso al Fueno.

Kelkaj el niaj membroj partoprenis diversajn Esperanto-aranĝojn en eksterlando, precipe en Pollando, kie okazis Universala Kongreso de UEA (Universala Esperanto-Asocio).

La plej grava estis ekzameno, kiun faris juna Jonas Dalmose. Li ricevis diplomon de Esperanto-instruisto! Ni gratulas!

Koran dankon al vi ĉiuj por la bona kunlaboro en la jaro 2009!

Nordjutlanda Esperanto Klubo

Raportas Ejnar Hjorth

En 2009 la klubo havis 26 membrojn.

La kluba aktiveco estas precipe esperanto-kursoj, ni havas tri kursojn en tri niveloj. Ĉiujare ni ankaŭ aranĝas ekspozicion en Aalborghallen. Tie ni disdonis multajn broŝurojn kaj slipojn pri ESPERANTO-QUIZ kaj ricevis kelkajn respondojn. Al ili ni sendis libro-premion kaj la unuan kajeron de la Friis-kurso, kaj invitis ilin al kurso dum la aŭtuno.

Ni disdonis kelkajn ekzemplerojn de broŝuroj al la Universitato kaj al Studenterhuset, sed tio ankoraŭ ne donis rezulton. – Tamen ni semas kaj semas ...

Paperaj gazeteltondaĵoj

Novembro 2009

Prelego de Hans Jørgen Kristensen menciita dufoje en Næstved-komunikiloj.

Ugebladet Næstved: Asocia registro.

Krucvortenigmo en Hjemmet.

Decembro 2009

Prelego de Ole Pilegaard Hansen menciita kvarfoje en Næstved-komunikiloj kaj en Berlingske Tidende AOK.

Jernbanefritid: Vinterstudier giver sommerrejser.

Sjællandske Næstved: Memorvortoj pri Oliver Hansen.

Denove relative magra rezulto, do daŭre memoru sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved.

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 5572 1240, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk.
Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111.

Okazos

Ve 12.02 je h 19.30: Danlingva prelego: Trezoroj de Irlando. Lene kaj Jan Niemann rakontas.

Ve 19.02 je h 20.00: Ĝenerala kunveno de EUN.

Ve 26.02 je h 14.00: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj: pritrakto de ĉapitro 33.

Ve 05.03 je h 19.30: Danlingva prelego: Mogens Rude Andersen pri konstelacioj.

Ve 12.03 je h 19.30: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj: pritrakto de ĉapitro 34.

Ve 19.03 je h 19.00: DEFA-kunveno kun faka enhavo

Ve 26.03 je h 19.30: Kunveno kun Faktoj kaj Fantazioj: pritrakto de ĉapitro 35.

Ve 09.04 je h 19.30: Sezonfino kun ujutno kaj ion por la stomako.

Okazis

2009: 20.11. Studado.

04.12. Danlingva prelego pri genealogio. Ole Pilegaard Hansen verve rakontis kaj instruis.

11.12. La tradicia jul-aranĝo kun abunda manĝaĵo.

2010: 08.01. Danlingva prelego kun interesa filmo pri la sorto en Danio de maljunuloj de alia etna origino ol dana. Tom Borgmann prezentis. Pensige.

29.01. Studado.

Forpasoj

Ene de du monatoj la Esperanto-movado en Næstved suferis du forpasojn. Meze de decembro Erik Hansen, Høng, subite mortis tuj antaŭ nia tradicia jularanĝo, ĉe kiu li ordinare estis gaja kaj sprita partoprenanto, kaj la 25an de januaro per trafika akcidento perdis sian vivon Oliver Hansen.

Ambaŭ estis gravaj subtenantoj de la loka unuiĝo: Erik Hansen, antaŭa LEK-ano (filo de Holger Hansen, famkonata en la laborista E-movado), ĉiam sentis sin apoganto de la ideo, kaj kune kun sia poldevena edzino Anna malavare ofertis siajn talentojn al ni kaj al infanoj en ilia ĉirkaŭo, eble precipe kiel jul-koboldoj en diversaj aranĝoj.

Oliver funkciis dum kelkaj jaroj kiel kasisto de la loka unuiĝo, interalie dum jarkunvenaj aranĝoj, kaj ĉiam li kun altruismo apogis la lokan agadon, kvankam certaj malakordoj forigis lin de la membreco.

Ambaŭ estis firmaj kolonoj de nia movado. Ke ili ripozu pace!

EUN

Kopenhago

Jen la printempa programo 2010 de Konversacia Esperanto-Klubo. Kunvenoj okazas ĉiun lundon ekde la 19:30 en Tomsgårdsvej 35.

Februaro

- 8 Kantvespero.
- 15 Jarkunveno de KEK
- 22 La Tago de Gepatraj Lingvoj (t.e. la 21-a februaro). La Semajno de Internacia Amikeco t.e. la lasta semajno de februaro).

Marto

- 1 Regin Larsen prelegos pri la junulara agado.
- 8 Henning kaj Karen distros nin per numero-ludo.
- 15 Studgrupo. Gvidanto Bent Wiinberg
- Sabate la 20-an de marto: SEA-a kunsido en Helsingborgo.
- 22 Bent Jensenius prelegos ‘pri la historio de instrumetodoj de fremdaj lingvoj. Interese por ĉiuj, kiuj jam lernis fremdan lingvon. Cetere la prelego estos spicita per multaj ‘anekdotoj.’”
- 29 Prelego: Jacob Nordfalk prelegos pri maŝintradukado Esperanta.

Aprilo

- 5 (Pro pasko neniu kunveno)
- 12 Printempa aŭkcio
- 19 Studgrupo. Gvidanto Bent Wiinberg
- 26 Ole Terkelsen montros bildojn kaj rakontos pri Klint.

Vespero honore al Prof. Ivo Lapenna

Vendrede la 6-an de novembro 2009 la Civitana Domo en Danasvej 30 B estis plena je esperantistoj kiuj volis honorigi la 100-jariĝon de prof. Ivo Lapenna (1909-1987).

Laŭ sia kutimo la Kultura Grupo faris bone preparitan kaj enhave riĉan programon.

Dank'al la komputila tekniko en formo de son- kaj fotoprezento ni estis rekte alparolitaj de Ivo Lapenna. Lian mesaĝon al finna-sveda renkontiĝo 1981 kaj paroladon je la inaŭguro de la skulptaĵo 'La Espero', Graz 1987, mi kun granda intereso aŭskultis. Kiam mi aŭdas tiajn prelegojn mi ne povas ne pensi pri tio kiel grave estas por ni esperantistoj ĉiam ekzerci pli bele paroli en esperanto kaj pli saĝe prezenti nian aferon.

Ni vidis ankaŭ filmon pri lia bela naskiĝlando, Kroatio, kaj ĝia kulturo. Estis kelkaj prelegoj pri Ivo Lapenna, interalie tre interesa prelego de Sven Ziegler pri lia kunlaboro kun li. Parolis Mogens Rude Andersen, Torben Svendsen, kaj Erik Høg per letero laŭtleĝita de Birthe Lapenna.

Kelkaj poemoj dediĉitaj al li, ĉefe pro unu el liaj plej grandaj atingoj, la sukceso ĉe la Unesko-konferenco en 1954, estis laŭtleĝitaj de Lene Niemann.

En la paŭzoj klasika muziko kaj bonaj trinkaĵoj kaj nutraĵoj certigis la sukcesan kaj enhavoriĉan vesperon.

Dankon al la organiza komitato kiu konsistis el Alexander Kogan, Torben Svendsen kaj Mogens Rude Andersen! Mi tute konsentas kun ili ke ege gravas honorigi niajn movadajn gravulojn kiel Lapenna kaj Zamenhof. La memorvesperoj pri ili estis tre bele faritaj. Kaj por plej bone daŭre honorigi ilin ni nun rigardu antaŭen por daŭrigi ilian laboron, ĉiu laŭ sia kapablo.




Sten Svenonius kun brazila-meksika familio

Sten Svenonius

Tre interesa evoluado en la anglalingva mondo

1. En decembro 2009, la usona retejo por senpaga lingvolernado “Livemocha” <http://www.livemocha.com/>, kiu havas 4 milionojn da membroj en la mondo, aldonis Esperanton al la 35 lingvoj, kiujn ĝi jam proponis.



2. La nov-jorka eldonejo Mondial <http://www.librejo.com/>, kiu okupas belan lokon inter la Esperanto-eldonistoj, publikigis referencan 740-paĝan enciklopedion de Geoffrey Sutton pri la originala literaturo en Esperanto : “Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto”. Principe en marto 2010, ĝi aperigos vortaron "ENGLISH-ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY" de profesoro John C. Wells (rabato ĝis la fino de februaro).
3. Sur la retejo “Ideas for Change in America” aperas propono de Renata Ventura, teksasa ĵurnalistino: “Obama, introduce Esperanto as a Second Language subject in schools” por enkonduko de Esperanto kiel dua lingvo en la usonaj lernejoj. Simila propono, antaŭ unu jaro, estis inter la 25 plej sukcesaj inter pluraj miloj, tiel ke UEA fariĝis ekde tiam partnero de Change.org.
4. La omaĝo de Google al D-ro Zamenhof, okaze de la 150-a datreveno de lia naskiĝo, la 15-an de decembro 2009, havis vastan eĥon kaj plue havas sekvojn tra la mondo. Jam en video-reklamo por Gmail, Google simpatie aludis al Esperanto : <http://www.google.com/mail/help/fightspam/getstarted.html> (ĉirkaŭ la fino, ekde 1:55).
5. La programo “Springboard to... languages”, kiu celas faciligon en lingvolernado per Esperanto kiel saltotabulo, estas brita iniciato : <http://www.springboard2languages.org/home.htm>.
6. Klopodo ekzistas ankaŭ en Aŭstralio por enkonduko de Esperanto en

lernejoj kadre de LOTE (Language Other than English – Lingvo alia ol la angla): “The World of Primary Esperanto” (video: <http://www.youtube.com/watch?v=7H4hfuYvU4g>).

7. Plej laste, la granda londona firmao pri lingvolernaj metodoj Eurotalk aldonis Esperanton inter 120 ĝis nun proponitaj.

Ni ne forgesu tiujn ĉi vortojn de Lord Robert Cecil, brita delegito, kiu, en 1922, admonis la Komisionon de Intelekta Kooperado de la Ligo de Nacioj “memori, ke helpa mondlingvo ne estas bezonata nur de la intelektuloj, sed antaŭ ĉio de la popoloj mem”, dirante tion en la momento kiam la franca registaro obstineme strebis sufoki proponon favore al la instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj de la mondo. La landoj, kiuj iniciatis tiun proponon, en septembro 1921, estis : Albanio, Barato, Belgio, Ĉeĥo-slovakio, Finnlando, Ĉinio, Japanio, Kolombio, Persio (Irano), Rumanio, Sudafriko kaj Venezuelo.

Henri Masson

La eŭropa lingvo

La jena artikolo aperis en tutpollanda semajna revuo “Fakty i Mity” / Faktoj kaj Mitoj, n-ro 4(516) de 28.01.2010. – (eldonkvanto 150.000 ekz.). Prilaboris ĝin Kazimierz Krzyżak kaj esperantigis Edward Jaśkiewicz.

La eŭropa integra procezo pli kaj pli perfektigas ĉiujare, do ni pli proksimiĝas al aŭtentika unuiĝo kaj konsolido de la tuta Eŭropo je unu korpoparto de diversaj nacioj. Tamen estas unu kondiĉo.

Ni havas komunan himnon, flagon kaj valuton. La problemo estas nur akcepto de komuna lingvo por Eŭropo, pri kiu oni kontinuas persistajn diskutojn. Sen ebligo al ĉiuj homoj de Eŭropo facilan interkompreniĝon helpe de facila kaj neŭtrala lingvo, la eŭropaj nacioj daŭre restos por si reciproke fremdaj kaj neniam ĝisfine integriĝos.

Kiel aktuale aspektas la aferoj? Nuntempe en Eŭropa Parlamento laŭ principoj de ŝajna egaleco estas parolataj preskaŭ 40 lingvoj, ĉar krom membroŝtataj naciaj lingvoj estas allasitaj ankaŭ lingvoj de iuj minoritataj nacioj. Malgraŭ tiu egaleco ekzistas la lingvoj pli „egalaj”, kiel la: franca, germana, hispana kaj itala. Kaj „la plej egala” el ili estas la angla.

Pri ŝajna “egaleco” de ĉiuj eŭropaj lingvoj plej bone atestas la fakto, ke kiam oni kontraktas konvencion ekzemple en la pola kaj la angla lingvoj, do tiam estos deviga nur la angla teksto kaj la pola formas nur kiel ornamo.

Tiun eksterordinare komplikitan (pro tradukadoj kaj kostoj) la lingvan problemon oni penas ialmaniere solvi. Aprile de la 2004 jaro en EP oni aranĝis voĉdonadon por elekti komunan lingvon por Eŭropo. Por voĉdono oni proponis iujn naciajn lingvojn, kiuj ricevis nepercepteblan kvanton da voĉoj. Nur por lingvo Esperanto voĉdonis la plej multo, ĉar eĉ 43% da deputitoj.

Pri popularigo de E-lingvo atestas ankaŭ aranĝitaj interretaj sondadoj (www.freewels.com/international-languages), kie voĉdonis por Esperanto eĉ 70% da respondintoj.

Ĉi rezultoj elvokis panikon en tre forta anglalingva, influprema politika grupo. Por malgravigi tiujn favorajn por Esperanto voĉojn, Leonard Orban la komisaro de EU pri aferoj de la multlingveco – trudas utopian koncepton pri ŝajnaj ĉarmoj kaj valoroj de la multlingveco.

Por kredindigi ĉi koncepton, li iniciatis specialan komisionon, kiun konsistigis reprezentantoj de: “British Council”, “Instituto de Goethe” kaj “Centro de Popularigo de la franca lingvo kaj kulturo”, do la institucioj escepte neobjektivaj, interesiĝintaj nur pri popularigo de siaj propraj naciaj lingvoj. Tiu neobjektiva komisiono prezentis kelkajn nerealajn konkludojn: ĉiuj eŭropanoj, por interkomunikiĝadi devus dum sia tuta vivo lerni fremdajn lingvojn kaj trakti tion kiel sportan distron.

Tamen la plej esenca postulo de tiu komisiono estas penado por prezenti verkiston Józef Konrad Korzeniowski (Josef Conrad), kiel la imitindan modelon – ja gepatra lingvo por li estis la pola, sed vojaĝante tra la mondo, li sin priservis kiel tiaman dominantan la francan kaj verkis belan literaturon en la angla, ĉar li traktis ĉi lingvon kvazaŭ propran. Do ĉiuj eŭropanoj devus akcepti anglan lingvon kiel la PROPAN.

Tia konkludo esprimplene iras renkonte al hegemoniaj aspiroj de Britio, kiu per dominado de sia lingvo ekde jardekoj certigas al si politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn influojn, do preskaŭ kolonie dependigas Eŭropon.

Pri la sama dominado konkuras kun Britio – kvankam ne tro efike – Germanio kaj Francio, eĉ Hispanio kaj Italio. La pola eksministro pri kulturo Zdzisław Podkański preferus, ke Pollando strebu al la grupo de privilegiaj landoj. En la forumo de eŭropa debato de civitanoj li proponis,

ke la pola lingvo reprezentu slavajn landojn kaj restu enkalkulita kiel la sesa en la vico de dominantaj en Eŭropo. Por teni tiun dominadon oni disvastigas miton pri ŝajna universaleco de la angla lingvo. Ĝi estas ja mensogo, ĉar en Eŭropo anglalingve parolas nur malmultnombra grupo da homoj, kiuj finregis tiun ĉi lingvon tamen en nesufiĉa grado. Vasteco de la angla lingvo en la mondo malpligrandiĝas, ĉar pli multo de ekskoloniaj landoj revivigas siajn naciajn lingvojn.

La elstara lingvisto Claude Piron, kiu estis parolanta multajn lingvojn, ekstradukisto ĉe UN, frakase opiniis pri la angla lingvo kiel homonimeca, tre malfacila en prononcado kaj skribado. Li konsideras, ke eĉ multjara lernado ne garantias bonan majstradon per la angla lingvo. Tial lukson povas permesi al si nur malmultaj.

Kian problemon kaŭzas dominado de angla lingvo en la mondo, plej bone atestas ekzempla incidento kia eventis en septembro de la 2007. sur aerodromo en Vancouver, kie la polo Robert Dziekański iĝis murdita de policianoj nur pro tio, ke li ne konis la anglan kaj ne scipovis kun ili interkompreniĝi.

En la forumo de EU-komisaro pri multlingvecaj aferoj Leonard Orban (<http://forums.ec.europa.eu/multilingualism/languages-for-young-people/it/>) en la temo – “Graveco de fremdaj lingvoj”, voĉdonis jam pli ol 825 personoj el tuta Eŭropo kaj plimulto da voĉoj estis por Esperanto.

La ideo de Esperanto, kiel la plej facila lingvo kaj enkonduko ĝin lernejojn, ankoraŭ pli multe dominas en aliaj internaciaj TTT-ejoj de tiu debato. Precipe en tiaj landoj kiel Germanio, Francio aŭ Britio. Eĉ la angloj, kiuj ne ŝatas lerni fremdajn lingvojn, ĝuste – ho mirindaĵo – tre volonte lernus ĝin.

Se ni plu indiferente rigardos la provojn de trudado de la angla dominanta lingvo por Eŭropo kaj eĉ sen antaŭzorga saĝo senkritike apogostion, do en baldaŭa estonteco ni povos dividi la sorton de indianaj popoloj, kiuj nuntempe regas nur la anglan, la hispanan aŭ la portugalan, sed siajn proprajn lingvojn ili jam ne konas.

26-a Rusia Esperantista Kongreso

La 26-a REK okazus en Sankt-Peterburgo la 27-31-an de majo kun la devizo “Esperanto – la lingvo de popola diplomatio”.



Antaŭ 100 jaroj (1910 j.) en Sankt-Peterburgo okazis unua Rusia Esperantista Kongreso, en kiu partoprenis kreinto de la lingvo Esperanto Ludoviko Zamenhof. Rusiaj esperantistoj celebros la jubileon per tradicia tutlanda kongreso en la dua rusia ĉefurbo kaj invitas gastojn el la tuta mondo.

Venu ĝui belegan urbon, ĝiajn muzeojn, teatrojn, katedralojn; promeni piede en parkoj kaj ŝipe sur kanaloj kaj rivero Neva; venu ekkoni rusan kulturon kaj trovi amikojn inter rusiaj esperantistoj !

La kongresejo troviĝas tre oportune – en centra parto de la urbo, nur dek minutojn piede de la stacidomo “Finljandskij” (Finnlanda) kaj metrostacio “Ploŝĉjadj Lenina” (Lenin-placo). Tute proksime estas bordo de la rivero Neva. Adreso de la kongresejo – Kulturpalaco “Viborgskij” (ruse: Viborgskij Dvorec Kuljturi), strato



Komissara Smirnova, 15. En dispo de la Kongreso estas bonaj teatra-koncertaj haloj kun necesa ekipaĵo, konferenca aŭditorio, klasĉambroj. En vastaj vestibloj estas bufedejoj, kie eblas iom trinketi kaj manĝeti dum paŭzoj. En la kulturpalaco estas ankaŭ restoracio kaj malgranda hoteleto.

La programo de la Kongreso estos varia kaj multflanka. Enkadre de la Kongreso okazos vica konferenco de REU, kunveno de REJM, prelegoj pri historio de Esperanto-movado en Rusio, pri interlingvistiko, pri lingvaj festivaloj. Ni atendas kontribuojn por la programo ankaŭ de vi! La kongresanoj spektos teatraĵojn en Esperanto kaj kelkajn koncertojn. Estos abunda turisma programo, kiun ornamas "blankaj noktoj" kaj Urba Festo okazonta en samaj datoj en Sankt-Peterburgo!

Por la kongresanoj estas rezervitaj loĝlokoj en hoteloj de diversa nivelo, situantaj ĉefe en centra parto de Sankt-Peterburgo. La mendilo por la hoteloj kaj por ekskursaj programoj estos sendita al la kongresanoj kun Dua informilo en decembro.

Kontaktoj de la Organiza Komitato:

ĝenerala ret-poŝta adreso – **kongreso@reu.ru**,

pri aliĝoj, kotizoj, loĝado, invitletoj k.t.p. - **rek-financoj@reu.ru**

Prezidanto de la Organiza Komitato, turisma programo – Anna Butkeviĉ:
annaespero@mail.ru

Pri arta programo – Mikaelo Bronŝtejn: **mamuto@rambler.ru**

Pri enhavo de prelegoj kaj diskutoj – Nikolao Gudskov

nikolao@yandex.ru

Pri rilatoj kun gazetaro kaj urbaj instancoj – Valentin Seguru

seguru@reu.ru

Pri ceteraj organizaj aferoj – Vjaĉeslav Ivanov **amikeco@gmail.com** kaj
Anatolo Sidorov **anasido@gmail.com**

Kotiztabelo de REK, valida por danoj

| | Ĝis 31.12.09 | 01.01- 31.03.2010 | Post 31.03.2010 |
|--------------------------|-----------------|----------------------|--------------------|
| Membroj de REU (eŭroj) | 50 | 65 | 80 |
| Nemembroj de REU (eŭroj) | 65 | 80 | 95 |

Junuloj naskiĝintaj post 31.12.1980, handikapuloj kaj familianoj ricevas
rabaton – 50%

Infanoj ĝis 16-jaraĝaj aliĝas senpage.

La aliĝkotizo estas pagenda al kasisto de REU uzante sekvajn pag-
manierojn:

1. Per eŭroj al uea-konto – “reua-p”. Kotizante al UEA nepre sendu
kopion de ĝirpeto al “rek-financoj@reu.ru”
2. Per eŭroj ĝirante al kontoj en Raiffeisen-bank, en UniCredit-bank
(detalojn petu ĉe “rek-financoj@reu.ru”)
3. Per rubloj uzu ordinarajn pagmanierojn:
4. <http://reu.ru/index.php?parto=membreco&pagmanieroj=jes&lng=eo>

Pri ĉiuj demandoj koncerne de aliĝo kaj kotizado skribu al rek-
financoj@reu.ru

La kotizo ne estas repagebla

La aliĝilon plenigu en: <http://www.reu.ru/index.php?alighilo=REK-26>

Studu en Slovakio

Somera Esperanto-Studado (SES-2010) okazos inter la 2-a kaj la 10-a de julio 2010.

Jam la tria fizika *lernu!*-renkontiĝo okazos en okcidentslovaka banurbo Piešťany, situanta 80 km for de la slovaka ĉefurbo Bratislava kaj 160 km de Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio.

La programo konsistas el kelkaj partoj: **antaŭtagmeze** - instruado pri Esperanto, **posttagmeze** - ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, sportoj, laborgrupoj ktp.; **vespere** - Nacia kaj Internacia Vesperoj, koncertoj, filmo-spektado, diskoteko...

Esperanto-instruadon gvidos spertaj Esperanto-instruistoj en 4 grupoj, laŭ la lingvo-nivelo.

Pri la *lernu!*-programeroj zorgos *lernu!*-teamo. Eblas ĉeesti prezenton pri lernu.net, pri la traduk-sistemo de la paĝaro k.s. Vi estos bonvena iam ajn demandi aŭ proponi ion ajn, rilate al la paĝaro.

Novajoj por 2010:

- “**Flugiloj de malfacila vento**” - okazos seminario por instruemuloj!
- **Ekzamenoj de UEA** laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro
- **Seminario de TEJO “Instigi Kreemon”** - tiu ĉi aktivula trejnado celos instigi freŝan pensmanieron kaj krei novajn ideojn aŭ projektojn.

Pliajn detalojn vidu ĉe http://eo.lernu.net/pri_lernu/renkontighoj/SES/.



Partoprenantoj de SES-2009

OPDAG ESPERANTO



ET MEDRIVENDE SPROG



www.ikso.net

Frontpaĝo sur la dorspaĝo: nia nova varbilo